


# *Gazeto* *Andaluzia*

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

26-a Jarkolekto \* Junio 2010 \* N-ro 88

ISSN 1576 - 0618

## KONGRESLIBRO



15-a

**Andaluzia Kongreso de Esperanto**

*Jaeno, 30-a/31-a oktobro*

**2010**

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto**.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto

REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)

DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.

IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ

REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ

(esperanto14@ono.com)

Kunlaboris ĉi-numere: Julio Herrero Segura, Jordi Lietor.

Ángel Arquillos López

## **ENHAVO**

Salutvortoj .....	3
Bonvenon en Jaenon .....	5
Malaga Esperanto-Asocio .....	7
Esperanta Klubo Aksarkia .....	8
Sevila Esperanto-Asocio .....	9
Kordova Esperanto-Asocio .....	10
Grupo Gaditano de Esperanto .....	11
Onuba Esperanto-Asocio .....	11
Olivistoj .....	12
Alfonso Escamilla Roa .....	13
Asamblea General Extraordinaria de AEU .....	17
Kongresprogramo .....	18
Plano de la Urbo Jaeno .....	20
Prelegaro .....	22
Turismaj Vizitoj .....	27
La Kongresejo.....	33
El Jaena Rid-punkto .....	35
Notoj .....	38

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



## SALUTVORTOJ

Saluton al ĉiuj gesamideanoj, geamikoj kaj ne-konatuloj. Mi plezure, honore kaj tutkore salutas vin ĉiujn. La unua kaj plej interesa afero hodiaŭ devas esti memori nian samideanon

ALFONSO ESCAMILLA ROA, naskiĝinta en vilaĝo Santiesteban del Puerto, jaena provinco, loĝanta dum multaj jaroj en Pegalajar, malgranda vilaĝo en ĉi tiu provinco, kie li laboris dum multaj jaroj kiel muzikisto (direktisto de publika muzik-bando), pentristo (li pentris kaj restaŭris unu el la preĝejoj en tiu vilaĝo), sed li ĉefe estis instruisto. Pli poste, ĝis sia morto, li loĝis kaj laboris en la urbo Linares, kie li estis konata kiel *“la profesoro”*. Li esperantiĝis en la jaro 1931, dum sia restado en Jaén, kie li studis la trian kurson de sia kariero. Iam li hazarde trovis broŝuron titolita *“La ŝlosilo de Esperanto”*. Per sia pacema spirito li konsciis, ke Esperanto povus esti efika komunikilo por ke la homo solvu la grandan problemon je komunikado kaj kun granda entuziasmo kaj espero, verkis la libron titolita *“La lengua del mundo”* (La lingvo de la mondo).

En ĉi tiu libro li parolas pri siaj spertoj kaj precipe pri siaj konoj, ĉar li aldonas interesan metodon por lerni Esperanton. Nia kara samideano Escamilla bedaŭrinde mortis antaŭ du jaroj. Estas ankaŭ menciinda la urbon Linares kaj ĉi foje ne pro la fakto, ke S-ro Escamilla loĝis tie, sed pro alia kurioza afero, ĉar iu protestanta Pastro, JOHN NISBET WILSON, en la jaro 1904, kiam multaj eksterlandanoj venis en la urbon por ekspluati arĝentajn minejojn, gvidis kurson de Esperanto en la teraso de evangelia preĝejo. Bedaŭrinde oni ne scias multe pri li, mi trovis nenion en la reto.

Hodiaŭ estas speciala tago por mi, ĉar mi kunsidas kun homoj kies pensmaniero estas la mia, kompreneble, rilate la lingvon internacian. Kaj ĉi renkontiĝo okazas en la urbo kie mi loĝis dum miaj junaj jaroj, kvankam mi naskiĝis en Linares. Pasis multe da tempo kaj la urbo fariĝis duoble granda kaj duoble bela kaj mi sentas ĝin ankoraŭ mia kaj mi esperas ĝui ĝin denove promenante kune kun vi ĉiuj, ĉar valoras la penon viziti la monumentaron, ĉefe la katedralon kaj la kastelon.

Hodiaŭ estas speciala tago ne nur por viziti vidindaĵojn, sed por praktiki la lingvon kun homoj el diversaj lokoj de Hispanio kaj eksterlandanoj, kaj por konatiĝi kaj profiti la okazon paroli pri la celo de la internacia lingvo, se eblas ĉiam en Esperanto, se ne eblas, ĉar ne ĉiuj la ĉeestantoj al la kongresoj estas lertaj esperantistoj, ni rajtas iomete krokodili, kaj la plej kuraĝaj devas klopodi sentime kaj senhonte paroli. Ĉio bonas, ĉar nia celo estas kompreni unu la alian per unusola lingvo, la lingvo internacia.

Mi konscias, ke la monatoj oktobro kaj novembro ne estas taŭgaj por ferii aŭ kongresi, tamen ni profitis semajnfinojn por faciligi la aferon al vi, kaj mi esperas sukcesi malgraŭ malbona vetero, sed bona kongresejo kaj bona etoso. Ĉar nia kongreso estas regiona, sufiĉas tri tagoj, sed la tempo tre rapidas, do ni devas profiti ĝin por ĉeesti ĉiujn eventoj ĉar la LKK aranĝis kelkajn surprizojn kaj ili estas tre dankemaj. Do, ni rajtas kaj ni devas esti kunigitaj almenaŭ dum la paroladoj pri gravaj temoj, ĉar ni translokiĝis el niaj urboj ne nur por vizitado de alia, sed por kunsido kun gesamideanoj kaj por konstanti, ke Esperanto sukcesas kaj ke ni kapablas diskonigi ĝin kien ajn ni iras.

Hodiaŭ ni havos la okazon aŭskulti homojn, kiuj parolos pri diversaj temoj, ĉu en Esperanto, ĉu en la kastilia, sed ĉiam pri nia lingvo, kaj mi povas certigi, ke la temoj estas tre gravaj kaj multaj el vi surpriziĝos aŭdante la historiajn sciigojn. Dankon al ĉiuj kaj fruktodonan kongreson.

*ÁNGEL ARQUILLOS LÓPEZ, Prezidanto de A.E.U.*



## BONVENON EN JAENO !



*Jaena Esperanto-Asocio*

**Kongreso:** *Solena kunveno de samcelanoj aŭ samprofesianoj, el unu aŭ el diversaj landoj, por diskuti komunajn literaturajn, sciencajn, politikajn, ekonomikajn demandojn.*

Jen la difino aperanta sur *Plena Ilustrita Vortaro* pri tio kion ni invitas al vi fari dum ĉi tiu semajnfino en Jaeno. Komprenoble, la difino ne nepre devas esti akceptita laŭvorte, kaj tiel estus preferinde demeti la “solenecon” de la kongreso. Anstataŭ tio ni preferas diri “amikema kunveno”; same la afero pri “samaj celoj” ne devas esti komprenita tiel, pro la fakto ke, kiam ni ĉiuj lernis la internacian lingvon, niaj celoj estis tute malsimilaj. Iuj pensis pri la monda paco, aliaj pri pliigo de la vojaĝ-eblecoj, kelkaj eĉ pri nova lingvo lernota. Do, unuvorte ne estas dezirinde, ke ni ĉiuj pensu same rilate esperanton. Do, el la andaluza vidpunkto, *kongresi* havas alian signifon, oni povas difini ĝin kiel la uzo de komuna lingvo por paroli pri ĉio, absolute ĉio, eĉ por diboĉi se oni trovas la taŭgan momenton.

En Andaluzio, bedaŭrinde, ni ne disponas pri multnombraj eblecoj praktiki la internacian lingvon. Pro tio ni devas profiti tiujn malfotajn okazintaĵojn por paroli-paroligi kaj aŭdi-aŭdigi la zamenhofan lingvon. Krome, tiel ni montros al la ĉirkaŭanta socio, ke ni ekzistas. Do, la organizantoj de ĉi tiu 15-a Andaluzia Kongreso de Esperanto bonvenigas vin al ĉi tiu modesta sed revema; malmultenombra sed grandega; mallonga sed daŭra kongreso de esperanto en la plej suda lando de Eŭropo: Andaluzio.

Multaj el vi ne vizitis Jaenon antaŭe. Nia celo estos ankaŭ montri nian malgrandan urbon, eta ja, sed vizitinda kaj ĉefe ĝuinda. Verkisto diris iam, ke la mondo estas tio kio ĉirkaŭas Jaenon,



kaj verŝajne li pravis. Malgranda nombro da esperanto-parolantoj kongresas hodiaŭ en Jaeno kaj ĉi tiel, lingvo revata de Doktoro antaŭ unu jarcento fariĝas pli viva. Nia devo dum ĉi tiu semajnfino, krom ĝui, estas certigi la estontecon de nia lingvo en nia lando, diskonigi ĝin kiel eble plej efike...kaj paroli, reparoli, paroladi en esperanto. Tiel, ni certigos la ekziston de nia kara lingvo, tiel ni certigos, ke ĝi havas lokon en la mondo, en mondo kies centra loko dum ĉi tiu semajnfino estas Jaeno.

*La organizantoj de la 15-a Andaluzia  
Kongreso de Esperanto*



*Junulara Restadejo de Jaeno*

---

**Ĉu vi scias ke**, ĝuste antaŭ 100 jaroj aperis en la urbo San Fernando (Kadizo), la unua numero de la revuo *GAZETO ANDALUZIA* ? La eldonanto kaj animo de la revuo estis la prestiĝa kadiza advokato José GARZÓN RUIZ.

## MALAGA ESPERANTO – ASOCIO

### *Marbordo de la Suno*

La Malaga Esperanto-Asocio “*Marbordo de la Suno*”, fondita en la jaro 2005, estas neprofita asocio, kies celo estas la instruado kaj disvastigo de la lingvo Esperanto kaj ĝia kulturo en Malago. Feliĉe la Esperanto-Movado estas organizata de antaŭ multaj jaroj en Malago, antaŭe kiel esperanta sekcio de aliaj kulturaj grupoj kaj nuntempe kiel sendependa asocio.



Nuntempe la asocio organizas elementan kaj perfektigan kursojn de Esperanto ĉe la Lernejo “Al-Andalus”, ĉe strato Gustavo García Herrera en la malaga ĉefurbo. Krome, oni organizas praktikajn kaj konversaciajn klasojn, dum ili oni kalkulas kun la ofta kunlaboro de spertaj geesperantistoj kiuj eventuale vizitas Malagon, oni ne devas forgesi, ke Malago kaj sia marbordo estas grava turisma kerno en nia lando. De tempo al tempo oni organizas ankaŭ ekspoziciojn pri Esperanto, la lasta okazis ĉe la “Escuela Oficial de Idiomas” (Supera Lingvo-Lernejo).

Inter la agad-planoj de nia asocio estas daŭre kunlabori kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo en la disvastigo de Esperanto ne nur en la Malaga provinco, sed ankaŭ en la tuta lando. Ni ankaŭ laboras en la organizado de kurso ĉe la Malaga Universitato, por plenumi ĉi tiun sopiratan projekton ni kalkulas kun la helpo de la Grupo de Esperanto de Axarquía, kaj ĉefe kun Fabián Jiménez, kaj kvankam ne temas pri facila afero, ni estas tute certaj, ke nia laboregos por atingi ĝin, espereble sukceso estos la pinto de nia laboro.

## ESPERANTA KLUBO AKSARKIA

E.K.A. naskiĝis kiel malgranda junulara asocio en la urbo Vélez-Málaga, la ĉefurbo de la Aksarkia regiono ĉe la malaga provinco, cele la disvastigon kaj diskonigon de la internacia lingvo en la tuta Aksarkio. Ĉiujare ni organizas Esperanto-kurson, la instruado okazas dimanĉe ĉe la kafejo “*Punto Norte*”, kie ankaŭ troviĝas la sidejo de nia asocio.

Dum ĉi tiu jaro ni ankaŭ organizis ĉe la Gimnazio “Alta Axarquía”, kurson por tiuj kiuj deziras ekkoni la internacian lingvon. Partoprenis gejunuloj el ses vilaĝoj de la Malaga Aksarkio. Ni ankaŭ kunlaboras kun la Malaga Esperanto-Asocio en la presentado de projekto ĉe la Malaga Universitato, kie ni esperas organizi kurson pri Esperanto kaj ĝia kulturo kun akademia agnosko kaj valoro.

---

**Ĉu vi scias ke**, en Malago aperis la unua libro-metodo de la internacia lingvo Esperanto por hispan-parolantoj? Tio okazis en la jaro 1890, kiam la instruisto José Rodríguez Huertas eldonis libreton sub la titolo “*Linguo Internacia del Doctor Esperanto*”, tiam nia lingvo ankoraŭ estis konata kiel “*Lingvo Internacia*” aŭ simple “*Internacia*”. Esperanto estis nur la pseŭdomino de sia aŭtoro.

**Ĉu vi scias ke**, en la urbo Torrox, ĉe la malaga aksarkio, troviĝas unu el la plej longaj stratoj kun la nomo *Esperanto*? Ĝi mezuras pli ol unu kilometron, oni inaŭguris ĝin en la jaro 1987, okaze de Andaluzia Kongreso de Esperanto dum la jaro kiam nia lingvo jubileis siajn unuajn 100 jarojn da ekzisto.



## SEVILA ESPERANTO – ASOCIO



Sevila Esperanto-Asocio estas asocio naskiĝinta en Sevilo, kies ĉefa celo estas la uzo kaj disvastigo de la internacia lingvo esperanto, kiel lingvo de paco kaj de kultura interŝanĝo kaj alproksimiĝo inter ĉiuj popoloj de la planedo.

Alia el la celoj de la asocio estas la batalo kontraŭ la lingva diskriminacio kaj la defendo de la lingvaj rajtoj de ĉiuj popoloj.

Por la plenumado de niaj celoj estas antaŭvidintaj agadoj direktitaj al komencantoj de esperanto kiuj volas lerni la bazojn de la lingvo (bazaj kursoj de esperanto), kaj ankaŭ prelegojn kaj konversacirondojn de esperanto por tiuj kiuj volas progresigi sian scipovon de la internacia lingvo. La sidejo de nia asocio troviĝas ĉe la municipa kultura domo “Casa de las Sirenas”, ĝuste en la *Alameda de Hércules* en Sevilo. Tie, ni organizas ĉeestantan kurson de esperanto, ĝenerale ĉiumerkrede vespere.

Venontjare, en 2011, ni celebros la centjariĝon de la oficiala inaŭguro de la unua esperantista grupo en Sevilo, tiam fondita de Trinidad Soriano, la ĉefa Esperanto-aganto dum la unuaj jardekoj de la pasinta jarcento en nia urbo.

---

**Ĉu vi scias ke**, en la jaro 1984 la sevila turism-oficejo eldonis turismajn broŝurojn en esperanto? Jes, okaze de la Hispana Kongreso de Esperanto, okazanta tiujare en Sevilo, la urbodoma turisma oficejo de Sevilo eldonis tri turismajn broŝurojn en la internacia lingvo. Ili temis pri la Kvartalo Sankta Kruco, pri la Parko María Luisa kaj pri la turoj de la sevilaj preĝejoj.

## KORDOVA ESPERANTO – ASOCIO

Post la okazigo en Kordovo en la jaro 2008 de la Andaluzia Kongreso de Esperanto, la movado en nia urbo vivis nova epoko. Ekde tiam, kaj ĝis nun, oni provas organizi renkontiĝeton ebliganta refondigi nian asocion. Tiel, oni kontaktis kun kelkaj interesitoj en nia lingvo lernantaj ĝin pere de la interreta paĝo *lernu.net* kaj aliaj malmultaj interesitoj loĝantaj en kelkaj vilaĝoj de la provinco. Ankaŭ la ekzisto de propra TTT-paĝo en interreto kaj la apero de informoj pri la Esperanto-movado en nia urbo ĉe la ĵus kreita *cordobapedia.com*, provokis la reagon de kelkaj personoj kiuj petis informojn pri kiamaniere lerni la lingvon.



Esperable tiuj kontaktoj signifos dum la proksima jaro la refondiĝo de la Kordova Esperanto-Asocio, ene de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Ni pliiinformos pri tio.

---

**Ĉu vi scias ke**, en la jaro 1984 en Kordovo oni decidis fondi Andaluzian Esperanto-Unuiĝon? En la jaro 1983 okazis en Kordovo la 1-a Andaluzia Kongreso de Esperanto. Unu el la ĉefaj konkludoj de tiu kongreso estis la fondiĝo de andaluzia E-asocio. Tiel, en la venonta jaro naskiĝis Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Ankaŭ oni decidis aperigi esperant-lingvan revuon en Andaluzio. Tio ankaŭ okazis komence de la jaro 1984, kiam la unua numero de *Gazeto Andaluzia*, en sia dua epoko, aperis.

## GRUPO GADITANO DE ESPERANTO

*Esperanto el Kadizo*

Kadiza duopo, Antonio CASAS de Los Barrios kaj Daniel ONCALA de Algeciras, diskonigas nian internacian lingvon en la kadiza provinco. Tiuj interesitoj kunlabori kun ili povas kontakti pere de la elektronika adreso: [cadiz@esperantoandalucia.org](mailto:cadiz@esperantoandalucia.org)

Esperanto el Kadizo



ONUBA ESPERANTO-ASOCIO  
ASOCIACIÓN ONUBENSE DE ESPERANTO

## ONUBA ESPERANTO-ASOCIO

Fondita en la jaro 2004, ĉi tiu grupo ĉefe junulara, organizas kurson de la internacia lingvo Esperanto ĉe la Publika Biblioteko de Onubo.

Eblas kontakti kun la onuba grupo pere de la elektronikaj adresoj:  
[esperantoenonubo@gruposyahoo.com](mailto:esperantoenonubo@gruposyahoo.com) kaj  
[huelva@esperantoandalucia.org](mailto:huelva@esperantoandalucia.org)

**Ĉu vi scias ke**, en la jaro 2009 aperis la esperanto-traduko de *PLATERO Y YO?* Pasintjare, Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, kadre de la Hispana kaj Andaluzia Kongreso de Esperanto, okazanta tiujare en Malago, eldonis la libron *Platero kaj Mi*. Temas pri la mondfama verkaĵo de la elstara andaluza poeto Juan Ramón Jiménez, nobelpremiito en la jaro 1956. La esperanto-tradukon plenumis la Akademiano Miguel Gutiérrez Adúriz.

**Ĉu vi scias ke**, dum la 30aj jaroj kadiza strato havis esperanto-nomon? Komence de la 30-a jardeko la Kadiza Urbodomo decidis nomigi la ĝis tiam straton *Barrié* per la nova nomo “*Doctor Zamenhof*”, omaĝe al la aŭtoro de Esperanto. Post la milito la strato rericervis sian antikvan nomon.

## OLIVISTOJ

Andaluzoj de Jaén,  
olivistoj fier-staraj,  
kiu igis, diru mem,  
stari l'oliv-arbojn karajn?

Ne l'nenio agis, certe,  
nek la mon' nek la sinjor',  
sed la tero, mute, sperte,  
la ŝvitego, la labor'.

Kiuj, kune kun la pura  
akvo kaj l'planedoj oldaj,  
okupiĝis pri la dura  
belo de la trunkoj tordaj.

*Oliv-arb'*, ekstaru, diris  
ili ĉe la bazo venta,  
kaj el ter man' eltiris  
kun potenco fundamenta.

Andaluzoj de Jaén,  
olivistoj fier-staraj,  
kiu nutris, diru mem,  
mame l'oliv-arbojn karajn?

Vi, per via sang' fekunda,  
ne l'vampiro, la bandit'  
riĉiĝanta de l'profunda,  
nobla vundo de la ŝvit.

Tiu bienul' vin ĵetis  
en mizeron, kun vi luktis,  
viajn fruntojn li surtretis,  
viajn kapojn li reduktis.

L' oliv-arbojn vi kun am'  
faris sun' de vivo via,  
kaj el ili fontis pan'  
kiun manĝis nur alia.

Kiom da jar-centoj, kune  
kun katenoj kaj olivoj,  
sun-post-sune, lun-post lune  
pezas jam sur viaj vivoj!

Andaluzoj de Jaén,  
olivistoj fier-staraj,  
kiu rajtas, diru mem,  
mastri l'oliv-arbojn karajn?

Ek, Jaén, leviĝu brave  
el ŝtonaro lune svena,  
tute ne kondutu sklave,  
ĉar de oliv-arboj plena!

En oliv-oleaj hel'  
kaj aromo plej etera  
atestadas pri liber'  
via montetar' libera.

**Miguel Hernández**

Trad. Miguel Fernández



**ALFONSO ESCAMILLA ROA***Jaena Esperantisto**(1912 – 2007)*

Se iam oni pristudus la historion de Esperanto, kiel lingvo kaj kiel movado, en la provinco Jaeno, homo aperos ĉefrolule en tiu historio: Alfonso Escamilla Roa, *la majstro*. Ĉi tiu instruisto en la urboj Pegalajar kaj Linares, majstro de multnombraj generacioj de jaenanoj, dediĉis sian tutan vivon, inter aliaj kulturaj aferoj, al la instruado kaj disvastigo de nia internacia lingvo.



Bonŝance, ni disponas pri tute fidebla fonto por koni la esperantistan vivon de S-ro Escamilla, ĉar li rakontis siajn esperantajn spertojn en la libro omaĝe al li eldonita de antaŭ 3 jaroj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Li kontaktis unufoje kun nia lingvo en la jaro 1931, kiam li studis ĉe la Porinstrua Lernejo de Jaeno, kaj tio okazis kune kun aliaj tri studentoj, inter ili ankaŭ aliaj konataj jaenaj esperantistoj kiel la fratoj Uceda Flores (Antonio kaj Francisco) kaj José López Ros. Francisco Uceda havigis al tiu malgranda grupeto libro-metodon pri la internacia lingvo, kreita 40 jaroj antaŭe de pola Doktoro. La titolo de la libro, eble nur broŝuro, estis *Ŝlosilo de la Lingvo Esperanto*. La junuloj decidis mem-lerni la lingvon, tiu maniero lerni idiomon ja pruvas la altan intereson kaj lernemon de tiuj kiuj reale ĉeestis nenian klason aŭ eĉ ne aŭskultis profesoron paroli en esperanto.

Devis esti tiel granda ilian intereson rilate la novan lingvon, ke post kelkaj tagoj la projekto mem-lerni esperanton disvastiĝis inter lernantoj de aliaj fakultatoj. Ĉi tiel lernanto de la Inĝenieria Alt-Lernejo, aldoniĝis al la malgranda grupo. Esperantistoj ĉiam emas kontakti kun la plej apudaj samlingvanoj, tiel la grupo kontaktis kun S-ro Juan Anguita Galán, jaena esperantisto kaj posedanto de unu el la

plej gravaj paper-vendejoj en Jaeno. S-ro Anguita tuj “adoptis” tiujn novajn esperantistojn. La lernado de esperanto por tiu grupeto ne estis ne-daŭra afero, male ili decidis lerni la lingvon kiel eble plej taŭge, ekzemple la uzado de la hispana lingvo estis tute malpermesata dum la “klasoj”, eĉ la uzo de hispanlingvaj vortoj estis simbole mon-punita.

Juan Anguita, konanta la Esperanto-mondon, decidis aperigi korespond-peton en la tiutempa plej prestiĝa esperantlingva revuo, *Heroldo de Esperanto*. La reagoj estis tujaj. Oni ricevis leterojn en esperanto el Rusio, Britio, Germanio, Bugario, Rumanio, Pollando Ĉeĥoslovakio kaj Brazilo. La malgranda jaena grupo de junaj lernantoj eltrovis tiam la utilecon de la komuna lingvo. Sed la unua reala internacia kontakto de la grupo okazis dum la Foiro de Jaeno, do, meze de oktbro de la jaro 1931, pli-malpli 80 jaroj antaŭ nun. Okazis tiam, ke du germanaj esperantistoj, Paul Schalmey kaj Karl Hunold, kiuj forfuĝis el la nazia teroro, ekigis vojaĝon tra la tuta mondo dank'al esperanto. La valizoj estis modestegaj, nur dorsosako kun la vorto *Esperanto* kaj kvinpinta verda stelo. Tiu vojaĝo pasis tra la urbo Jaeno. La lingvo-lernado de la jaenaj junuloj ŝajnis sufiĉe bona, ĉar ili akompanis la du germanojn dum tri tagoj kaj ĉiuj kune vizitis la Katedralon, la Kastelon kaj la Kvartalon *La Magdalena*.

En la jaro 1934 Alfonso Escamilla iris en Sevilon por milit-servi. Inter la malgranda havaĵoj de la soldato troviĝis du libroj por daŭrigi la lernandon de esperanto, kvankam laŭ liaj propraj vortoj mankis al li taŭga vortaro. Do, li mem devis redakti propran liston de vortoj legitaj en la libroj, eble temis pri la unua *libro* verkita de Alfonso Escamilla en esperanto. La milito ekspluadas en Hispanio en la monato julio 1936. En oktobro oni soldatigis al Alfonso Escamilla, kiu devis iri en Valencion. Iutage, kiam li troviĝis ĉe la valencia stacidomo, iu alparolis lin pere de esperantlingva frazo: *Kiel vi fartas samideano? Ĉu vi parolas esperanton?* Ŝajnas, ke sur la milit-vestaĵo nia jaena samideano fiksis malgrandan verdan stelon. Estis bona ŝanco por koni la valencianjn esperantistojn. Verdire la militaj tempoj ja estis malfacilaj, tamen Alfonso Escamilla sukcesis trovi enhejman etoson ĉe la sidejo de la Valencia Esperanto-Grupo, kiun li vizitis dum siaj militaj forpermesoj.

La fino de la civila milito en Hispanio malfermis malhelan epokon en nia lando. Alfonso Escamilla preferis silenti kian ajn Esperanto-konon. Tamen, en la jaro 1952 ĵurnalo informis pri la okazigo en Valencio de la 13-a Hispana Kongreso de Esperanto. Tuj li kontaktis kun la Hispana Esperanto-Federacio kaj rapide aliĝis al tiu asocio. Ĉar li laboris tiam kiel instruisto en la vilaĝo Pegalajar, li estis ankaŭ la korespondanto de la ĵurnalo *JAÉN* en tiu vilaĝo. Do, li profitis siajn kontaktojn kun la ĵurnalo por aperigi de tempo al tempo, artikolojn pri la internacia lingvo. Pli ol 20 artikoloj aperis en tiu ĵurnalo inter la jaroj 1952 kaj 1972, verdire ĉiujare aperis ia ajn informo rilate esperanton sendita de nia samideano. Li eĉ preskaŭ atingis la aperigon en la jaena ĵurnalo de kurso de esperanto, tamen la projekto ne sukcesis, nur pro la malfacilaĵoj uzi la ĉapelitajn literojn en la ĵurnalo.

Kiel instruisto li ĉiam profitis siajn klasojn por paroli pri Esperanto al siaj gelernantoj, kaj en la jaro 1954 li eĉ organizis kurson de la internacia lingvo en Pegalajar (Jaeno). En la jaro 1959 li fariĝis delegito en Jaeno de Universala Esperanto-Asocio, delegiteco kiun li subtenis ĝis la forpaso de nia samideano.



Alfonso Escamilla Roa, junaĝe,  
la verda stelo sur la brusto.

En la jaro 1968 okazis en Madrido la 53-a Universala Kongreso de Esperanto. Alfonso Escamilla ne hezitis ĉeesti la kongreson, artikolo pri tiu sperto aperis post lia reveno, en la ĵurnalo *JAÉN*, verdire li profitis kiun ajn okazintaĵon por diskonigi la taŭgecon de esperanto kiel komuna lingvo inter diverslingvaj homoj.

Dum la 70-aj jaroj lia esperanto-agado konsistis el prelegoj kaj la organizado de elementa kurso en la urbo Jaeno

ĉe la Publika Provinca Biblioteko, tamen la projekto ne realiĝis por la malfermo dum kelkaj jaroj de tiu kulturcentro. En la jaro 1983 ni havis la grandan ŝancon koni lin persone, okaze de la organizado en Malago de la 2-a Andaluzia Kongreso de Esperanto. Post ĉi tiu jaro, kaj ĉefe pro la aĝo de S-ro Alfonso Escamilla, oni ne devas forgesi, ke li naskiĝis en la jaro 1912, lia esperantista agado baziĝis nur en la korespondado kun samideanoj de la tuta mondo. Malgraŭ lia aĝo li lernis uzi la komputilajn rimedojn por havi kontaktojn kun la tuta mondo.

En la jaro 1987 la vilaĝo Pegalajar, kie li laboris kiel instruisto dum multaj jaroj, omaĝis lin. Dum la omaĝa akto li profitis la okazon por peti al la Urbestro de Pegalajar la nomigon de kelka strato de la vilaĝo per la nomo *Esperanto*, verdire li estis ĉiam konstanta propagandanto de nia movado.

En la jaro 2007 S-ro Alfonso Escamilla Roa forpasis. Kelkajn monatojn antaŭe oni omaĝis lin okaze de la 12-a Andaluzia Kongreso de Esperanto, organizata tiujare en Palos de la Frontera (Onubo). Feliĉe li havis en siaj manoj la libron eldonita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo omaĝe al nia jaena samideano, kie kelkaj gesamideanoj verkis artikolojn al li dediĉitaj kaj kie oni parolis pri la plej amataj aferoj de li, tio estas la edukado, la vilaĝo Pegalajar, Esperanto kaj la urbo Linares.

Nun, kiam la andaluzia esperantistaro renkontiĝas en Jaeno, okaze de la 15-a Andaluzia Kongreso de Esperanto estas tempo memori kaj iom pli omaĝi al tiuj samideanoj, kiel Alfonso Escamilla, kiuj lernis la internacian lingvon kaj disvastigis ĝian pacan mesaĝon, malgraŭ la malfacilaj jaroj de li travivitaj.

*La Organiza Komitato de la  
15-a Andaluzia Kongreso de Esperanto  
Jaeno, 2010*



## ASAMBLEA GENERAL EXTRAORDINARIA DE LA ASOCIACIÓN ANDALUZA DE ESPERANTO

### Convocatoria

Como Presidente de la Asociación Andaluza de Esperanto / Andaluzia Esperanto-Unuiĝo (AEU), convoco a todos los miembros de esta asociación a participar en la Asamblea General Extraordinaria, que se celebrará el día 31 de octubre de 2010, a las 16:00 horas, en la Sala Úbeda del Albergue Intujoven & SPA de Jaén, sito en la calle Borja s/n, Jaén.

### Orden del Día

- 1.- Boletín, revista y blog de la Asociación.
- 2.- Participación de AEU en la futura Andaluzia Esperanto-Domo.
- 3.- Aprobación por los miembros de AEU de seguir o cesar en el Pacto con la Esperanta-Civito.
- 4.- Cuotas de AEU.
- 5.- Ruegos y Preguntas.

Málaga, 22 de octubre de 2010.

Firmado: Ángel Arquillos López, Presidente de la Asociación Andaluza de Esperanto / Andaluzia Esperanto-Unuiĝo (AEU).

### Autorización

Autorizo a \_\_\_\_\_,  
miembro de la Asociación Andaluza de Esperanto / Andaluzia Esperanto-Unuiĝo (AEU), para que me represente y vote en mi nombre las propuestas que se presenten en la Asamblea General Extraordinaria, que se celebrará en el Albergue Inturjoven & SPA de Jaén el día 31 de octubre de 2010.

Nombre y firma del socio que autoriza:

## 15-a ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO

Organizas: Jaena Esperanto-Asocio kaj  
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

### KONGRESPROGRAMO

- **Sabaton, la 30-an de oktobro:**

Ekde la 10:00 horo: Akceptado de kongresanoj, disdonado de la dokumentaro, interkona mateno, projekciado de esperantaj muzikvideoj.

11:00 horo: Malfermo de la libroservo de AEU.

11:30 horo: Malfermo de la Kongreso. Bonvenigo fare de la organizantoj. Salutvortoj de la AEU-Prezidanto kaj grupaj delegitoj de Andaluzio. Sinprezento de eksterlandanoj partoprenantaj la kongreson.

12:00 horo: Paŭzo, senpaga refreŝigaĵo.

12:15 horo: Prezento-kolokvo: *La Andaluza Esperanto-Domo*, fare de Julio Herrero Segura.

13:00 horo: Prezento de *Kiosko de Levanto (4)*, *transdisciplina almanako kun Esperanto kiel komuna lingvo*, fare de D-ro Wolfgang Güenter.

Ekde la 13:45 horo: Tagmanĝo (ĉe la kongresejo).

16:00 horo: Projekciado de la filmo *Angoroj*, de Jacques Louis Mahe, la unua longdaŭra filmo originale parolata en esperanto (1964).

16:30 horo: Prelego-kolokvo: *La proceso prila olivoleo-produktado*, fare de Jordi Lietor.

17:30 horo: Projekciado de la teatraĵo *Budapeŝta Ekzameno*, de Sandor Szathmari.

18:00 horo: Prelego-kolokvo: *Kiu bone prononcas Esperanton aŭ nefacila prononco de facila lingvo*, fare de Maciej Jaskot.

18:45 horo: Promenado kaj vizito tra la urbo.

• **Dimanĉon, la 31-an de oktobro:**

Ekde la 10:00 horo: Viziteblaj la ekspozicio kaj la libro-servo.

10:00 horo: Poezio en esperanto. Deklamado de du poemoj en esperanto kaj en la hispana lingvo kun klarigo pri la traduksistemo, fare de Angel Arquillos.

10:45 horo: Prelego-kolokvo: *La Mistera Jaeno: La Sankta Vizaĝo kaj la Belmezaj Vizaĝoj*, fare de José María Rodríguez.

11:30 horo: Projekcio de la teatraĵo *La Duonokulvitro*, de Aŭgusto Baissac.

12:00 horo: Hispanlingva prelego: *La Lengua Internacional en la Educación Intercultural*, fare de Antonio Fabián Jiménez.

13:00 horo: Prezento-kolokvo: *Miaj travivaĵoj kun Esperanto*, fare de Andrés Martín kaj Luis José Sánchez.

Ekde la 13:45 horo: Tagmanĝo ĉe la kongresejo.

15:45 horo: Ĝenerala Kunsido de AEU.

17:15 horo: Amuzaj rakontetoj, prezentataj de Esperanta Klubo Aksarkio.

18:15 horo: Spektado de mallongaj filmoj subtitolitaj en esperanto, kun posta debato kun la direktoro J.M. Asensioi.

19:15 horo: Fermo de la Kongreso kaj elekto de la venontjara kongresurbo.


19:30 horo: Promenado kaj vizito tra la urbo

Tiuj kongresanoj kiuj dum la lundo 1-a de novembro troviĝos en Jaeno povos ekskurzi al vizitindaj lokoj en Jaeno kaj komuni tagmanĝi.

*La Andaluziaj Kongresoj de Esperanto ne estas fermitaj renkontiĝoj kie ĉio estas jam planita. Do, tio signifas, ke la programo povas esti ŝanĝata dum la propra kongreso por faciligi la partoprenon de ĉiuj kongresanoj.*



## URBO JAENO



## KONGRESA PRELEGARO

### ✓ **La Andaluza Esperanto-Domo.**

Julio Herrero Segura (Malago)

La projekton pri la starigo de Andaluza Esperanto-Domo oni prezentos dum ĉi tiu Kongreso. Ekzistas la ebleco aĉeti tri-etaĝan domon sur la centro de la urbo Malago kie Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kaj la Malaga Asocio povos havi sian sidejon. Kompreneble ĝi utilis kiel centro el kie disvastigi la internacian lingvon kiel eble plej efike, ekz. organizado de kursoj, renkontiĝoj, ekspozicioj, bibliiteo, ktp. Julio Herrero parolos al ni pri la ideo, prezo de la domo, pag-maniero, ktp.



*Julio Herrero Segura, Malago 1954. Li laboras kiel Mara Agento ĉe la Haveno de Malago. Li eklernis esperanton en 1977 dum ĉeestanta kurso ĉe Vegetarana Asocio. En la jaro 1981 li kunfondis Esperanto-Grupon en sia urbo.*

*Ekde tiam li senĉese agadas en la Esperanto-Movado de Malago kaj de Andaluzio. Li kunorganizis hispanajn kongresojn de Esperanto en la jaroj 1982, 1994 kaj 2009 kaj preskaŭ ĉiuj Andaluziaj E-kongresoj. Li estas Sekretario de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kaj Prezidanto de la Malaga Esperanto-Asocio.*

### ✓ **Kiosko de Levanto (4), transdisciplina almanako kun Esperanto kiel komuna lingvo.**

Wolfgang Güenter (Alakanto)

La revuo *Kiosko de Levanto* estas kultura revuo, aperanta unufoje en la jaro. Temas pri eldonaĵo libera, skeptika kaj interkultura kie Esperanto agadas kiel ponto-lingvo. Okaze de ĉi tiu prelego la propra eldonanto prezentos la 4-an numero de la revuo.



*Wolfgang Güenter estas germano, loĝanta ekde la jaro 2000 en vilaĝeto de la provinco Alakanto. Li lernis esperanton aŭtodidaktike dum la 8-a jardeko de la pasinta jacento. Li interesiĝas pri ekologiaj aferoj.*



### ✓ **La proceso pri la olivoleo-produktado**

Jordi Lietor (Jaeno)

Jaeno estas la loko kie oni produktas pli da oliv-oleo en la tuta mondo. La oliv-arbo, kaj la produktoj de ĝi devenantaj, estas la kerno kaj la bazo de la riĉeco de la tuta provinco. Tamen, ĉu vi scias kiamaniere oni produktas la tiel nomata *verda oro*? Okaze de ĉi tiu prelego ni tion lernos kaj ankaŭ oni aŭskultos pri la diversaj oliv-oleaj klasoj *virga*, *ekstra*, ktp.



*Jordi Lietor, jaenano kvankam naskiĝinta en Palamós (Katalunio) en 1976, li ankaŭ loĝis dum kelkaj jaroj en Germanio. Diplomita en Entreprenaj Sciencoj kaj en Turismo. Li laboris en diversaj entreprenoj dank'al siaj lingvaj konoj. Nuntempe li laboras ĉe la Andaluza Administracio.*

*Li kunfondis Jaenan Esperanto-Asocion kaj instruis la internacian lingvon ĉe la Popola Universitato de Jaeno.*

---

Memoru ke ĉiuj prelegoj reale estas prelego-debatoj. Do, la aŭskultanto povas libere partopreni pere de personaj kontribuoj al la temo, demandoj al la preleganto, ktp. Kvankam la uzo de la lingvoj esperanta aŭ hispana estas tute libera, laŭ elekto de la partoprenanto, ni konsilas uzi la internacian lingvon, ĉar temas ne nur pri diskonigo de la prelegata temo, sed la prelego kaj debato utilas ankaŭ kiel praktikilo por paroli/aŭdi la internacian lingvon. *La organizantoj de la Kongreso.*



✓ **Kiu bone prononcas Esperanton aŭ nefacila prononco de facila lingvo.**

Maciej Jaskot (Granado / Pollando)

Esperanto, simpla kaj facila lingvo kie ĉiuj literoj havas konkretan kaj ĉiaman sonon. Tamen, ĉu temas pri facilaj sonoj? Verdire, la hispanparolantoj kaj ĉefe ni, la andaluzoj, ofte havas problemojn por prononci bone ĉiujn esperanto-sonojn (b/v; h/h̃; c/z...) Maciej Jaskot, esperantisto, pol-lingvano kaj profesoro pri la hispana lingvo, parolos al ni pri ĉi tiuj aferoj.



*Maciej Jaskot, polo. En Pollando li estis instruisto pri hispana gramatiko. Krome li kunlaboris kun la Esperanto-Redakcio de Pola Radio. Ekde antaŭ kelkaj jaroj li estas profesoro pri la Pola Lingvo en la Universitato de Granado. Li daŭre kunlaboras kun Pola Radio, radio-elsendejo*

*kie estas eble aŭskulti la son-raportojn de ĉi tiu andaluza-polo.*

✓ **La Mistera Jaeno: La Sankta Vizaĝo kaj la Belmezaj Vizaĝoj.**

José María Rodríguez Hernández (Kordovo)

La hispana parapsikologio naskiĝis komence de la 7-a jardeko de la pasinta jarcento, kiam en vilaĝeto de la provinco Jaeno, Belmez, aperis misteraj vizaĝoj sur la planko. Centojn da eseoj oni verkis pri tiuj misteraj “Belmezaj Vilaĝoj” kaj nur kelkaj jaroj antaŭ nun oni prezentis kredindan teorion. Verŝajne Jaeno estas mistera tero kie ni ne nur trovas ĉi tiun parapsikologian enigmon, ĉar ekde la Mez-epoko alia misterio ekzistas, la relikvo de la Sankta Vizaĝo de Jesuo.

*José M<sup>a</sup> Rodríguez Hernández, Martos (Jaén) 1964. Advokato kaj ŝtatoficisto. Li lernis la internacian lingvon en la jaro 1980 kaj tuj li instruis la lingvon ĉe la Gimnazio kie li studis. Li kunfondis la Kordovan Esperanto-Asociacion kaj Andaluzian Esperanto-Unuiĝon. Li estas voĉdonanto pri Propagando de AEU kaj*



redaktoro de la esperantlingvaj revuoj “Gazeto Andaluzia” kaj “Jura Tribuno Internacia”.

✓ **La Lengua Internacional en la Educación Intercultural.**

Antonio Fabián Jiménez Jiménez (Vélez-Málaga)

La instruado de Esperanto ĉe tiuj lernejoj karakterizitaj pro la ekzisto de kultur-diverseco, antaŭenirigus la ideon pri “egaleco”, ĉar ĉiuj gelnantoj havus la saman bazon. Krome ankaŭ disvolviĝus ideoj kiel “komprenemo”, “toleremo” kaj “solidareco”, ĉar ĉiuj povus kompreni la malfacilaĵojn trovataj de eksterlandano por integriĝi en socio kie oni parolas alian lingvon. Bazitaj sur propraj spertoj la preleganto montros al ni la gravan rolon kiu la internacia lingvo povus ludi ĉe tiuj eduk-centroj.



*Antonio Fabián Jiménez Jiménez, Malago, 1980. Licenciito pri Historio. Li lernis la internacian lingvon aŭtodidaktike kaj tuj li instruis ĝin al sia amikaro. Gimnazia profesoro pri Historio, li laboras cele la enirigon de esperanto kun akademia valoro en la lernejoj kaj universitataj stud-planoj, laŭ la nuntempa hungara modelo.*

✓ **Miaj travivaĵoj kun Esperanto.**

Andrés Martín González (Malago) kaj  
Luis José Sánchez González (Malago)

Ĉiuj geesperantistoj povus rakonti aron da spertoj, travivaĵoj, anekdotoj eĉ fuŝaĵoj vivitaj dan’ al kaj pere de la internacia lingvo. Andrés Martín, veterana esperantisto, kaj Luis José Sánchez, kiu lernis la lingvon antaŭ malmulte da tempo rakontos al ni siajn travivaĵojn ĉi-sence. Kompreneble temas pri tute mal-fermita debato-prelego, kie ĉiuj

aŭskultantoj povos, rajtos kaj eĉ *devos* rakonti siajn personajn spertojn ĉi-rilate.



*Andrés Martín González, Navalmoral de la Mata (Cáceres). Instruisto. Li lernis la internacian lingvon komence de la 8-a jardeko. Li kunorganizis Hispanan Kongreson de Esperanto en la jaro 1982 kaj li estis la unua Prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Li instruis la internacian lingvon kaj kunlaboris pere de artikoloj pri edukado en diversaj esperant-lingvaj revuoj.*

*Luis José Sánchez González, Malago 1972. Inĝeniero pri Informadiko. Li estas profesoro pri Informadiko ĉe malaga gimnazio. Esperanton li lernis pere de lernu.net antaŭ kelkaj jaroj. Li havis la unuan ŝancon paroli la internacian lingvon okaze de la Esperanto-Kongreso organizata en Malago en la jaro 2009. Post tio li uzis esperanton okaze de diversaj vojaĝoj en Rusion kaj Germanion. Li ankaŭ parolas la rusan kaj la anglan lingvon.*



## NI PROTESTAS !

La organizantoj de la 15-a Andaluzia Kongreso de Esperanto protestas antaŭ la hispanaj diplomaciaj aŭtoritatoj pro la ne-koncedo de vizoj al niaj samideanoj Cao Xiongling, Tian Baocai de Ĉinio kaj Futi Nsimba Pierrinot de Kongo, por rajtigi al ili ĉeesti nian Kongreson. Ili aliĝis al la Andaluzia Kongreso de Esperanto, tamen la hispanaj aŭtoritatoj ne rajtigis al ili veni en Hispanion. Nia ĉina samideano Cao Xiongling planis prezenti ekspozicion pri esperanto kaj filatelio kaj nia afrika samideano Futi Nsimba Pierrinto planis prelegi pri la nuntempa situacio de la internacia lingvo en Afriko.

*La organizantoj de la Kongreso*

## TURISMAJ VIZITOJ

Dum la Kongreso oni planas organizi du turismajn vizitojn en la urbon Jaenon. Unu en la katedralon kaj alia en la historian kvartalon ĉirkaŭanta la kongresejon. Tiel, Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, kunlabore kun Jaena Esperanto-Asocio, eldonis du turismajn broŝurojn kun la celo utili kiel inform-dokumento akompananta la kongresanon dum la vizitoj. Tiujn broŝurojn oni disdonos al ĉiuj partoprenantoj en nia Kongreso.

### KATEDRALO DE JAENO

Kiam la kastilia reĝo Ferdinando la 3-a konkeris la urbon en la jaro 1249, li ordonis kristanigi la ĝis tiam islaman moskeon kaj establi sur ĝi la episkopan sidejon, kiu ĝis tiu jaro sidejis en Baezo. Unuamomente oni projektis starigi gotikan katedralon, tamen araba milit-razio detruis preskaŭ komplete la komencitan laboron. Do estis

necese rekomenci la projekton starigi katedralon. En la jaro 1494, pro difektoj en la muroj konstruitaj, estis necese plenumi grandan reformon en la konstruaĵo, kiu ekde tiam sekvis renasencajn modelojn. Pro tio, estas eble eltrovi la diversajn arkitektajn stilojn dum la konstruado. Tiel, la gotika modelo aperas sur la malsupra parto de la orienta flanko, tie vi povos trovi la fama *Barumet* (ankaŭ konata kiel *la simio*) kun turbano ĉe la angulo de la gotika friso.



La konstruado de la renasenca katedralo daŭris 164 jarojn, inter 1540 kaj 1724, kaj kompreneble partoprenis en ĝi multaj arkitektoj. Sendube la plej grava kaj tiu kiu estas konsiderata kiel la arkitekto de la Katedralo de Jaeno estias Andrés de Vandelvira. Li persone direktis la

konstruon de la kripto kaj la panteono. La sakristio estas konsiderata kiel unu el la arkitektaj laboraĵoj plej originalaj dum la hispana renascenta periodo, ĉar la kunmetado de kolonoj kaj arkoj solvas perfekte ĉiujn problemojn pri lumo kaj spaco. En la jaro 1575 forpasis Andrés de Vandelvira, sia posteulo Alonso Barba, fidele plenumis la planojn pripensitaj de Vandelvira. Do, malgraŭ la masimilaj arkitekturaj stiloj kaj la diversaj arkitektoj, tiu de Jaeno estas unu el la katedraloj kie la stila unueco estas pli videbla.

La plano de la Jaena Katedralo havas latin-krucan formon. Ĉe la brakoj troviĝas la Supera Sakristio kaj la Sanktejo. La rektangula surfaco mezuras 70 metrojn ĉe la faŝado kaj 100 metrojn ĉe la flankaj partoj. Oni konstruis la faŝadon fine de la 17-a jarcento, ĝi mezuras 32 metrojn laŭalte kaj 33 (sen la turoj)



laŭlonge. La du ĝemelaj turoj estas tipe renascentaj kaj oni starigis ilin komence de la 17-a jarcento. Kiel kuriozaĵo oni devas elstari, ke la norda turo posedas naŭ sonorilojn, male ĉe la suda turo troviĝas neniu sonorilo.

Ĉe la faŝado stariĝas la tri ĉefaj enir-pordoj. Sur la centra parto ni troviĝas la “Pordo de l’Pardono”, gardita de du skulpturoj de Sankta Petro kaj Sankta Paŭlo, kaj sur ĝi bildo reprezentanta la ĉieliron de la Virgulino Maria. Alia pordo, tiu nomita de “La Fideluloj” estas gardita de Sankta Mikaelo, kaj oni reprezentas sur ĝi la Edziĝon en Kanao. La alia faŝada pordo estas konata kiel “La Pordo de la Pastroj”, aperas sur ĝi bildo de la Fuĝo en Egiption de la Sankta Familio. Du aliaj pordoj troviĝas ĉe la flankoj de la Katedralo. La pordo de la suda flanko dezajnita de la propra Andrés de Vandelvira, super ĝi aperas reliefo de la Virgulino Maria; kaj la Pordo de la Norda Flanko kun bildoj de la Senmakula Koncipiteco, de Salomono kaj de Davido. Kiel kuriozaĵo oni devas elstari, ke meze de la enirpordo troviĝas tombejo de la

Katedrala Dekano Iñigo Fernández de Córdoba, forpasinta en la jaro 1624, kiu deziris resti tie por ĉiam por esti “de ĉiuj tretita”.

Sur la interna parto de la Katedralo videblas tri malsimilaj konstru-stiloj: la renasenco, la baroka kaj la nov-klasika. La plano estas dividita en tri navoj, apartigitaj de sveltaj kolonoj, kronitaj de belaj kaj simplaj volboj. La volbo de la transepto mezuras 12 metrojn laŭ diametro



La ĉefaltaro konstruita de ruĝa marmoro, estas kvin-metra kvadrato, meze de ĝi troviĝas la Tabernaklo, ĉirkaŭigita de ok korintikaj kolonoj. Post la altaro la ĉefretableto reprezentas la Ĉieliron de la Virgolino Maria. En ĉi tiu altaro kaŝiĝas pere de sep ŝlosiloj, belega relikvo: La Sankta Vizaĝo. Aliaj 17 malgrandaj kapeloj laŭflanke en la Katedralo estas dediĉitaj al diversaj

Sanktuloj, inter ili oni devas elstari la kapelon de Sankta Eŭfrasio, sanktulo naskiĝinta en la provinco Jaeno. La altaro de ĉi tiu kapelo estas unu el la plej belaj reprezentaĵoj de la nov-klasika arkitektura stilo. La jaena katedralo havas unu el la plej grandaj ĥorejoj en Hispanio. Ĝi disponas pri 148 sidlokoj, oni konstruis ĝin dum la 18-a jarcento. Sur la sidlokoj de la supra parto de la ĥorejo oni reprezentas bildojn de la vivo de Jesuo Kristo. Ĉe la malsupra parto aperas bildoj de la vivo kaj mirakloj de sanktuloj. Ĝi estas la sola katedrala ĥorejo kie la civilaj aŭtoritatoj havas ankaŭ rizervitajn ejojn, temas pri 26 sidlokoj rizervitaj por la urba konsilantaro.

### La Sankta Vizaĝo

Kristana tradicio asertas, ke kiam Jesuo marŝis en la Kalvarion kun peza kruco sur siajn ŝultrojn, virino nomita Veronika purigis lian



vizaĝon malpurigita tiam per sango kaj ŝvito. Mirakle, la vizaĝo de Jesuo stampiĝis sur la tol-peco uzita de la virino. Tradicie, oni kredas, ke la tolon gardis la unuaj Apostoloj kaj jam en Romo, Sankta Petro, donacis la relikvon al Eŭfrasio, unu el la sep junaj kristanoj senditaj



de Petro mem por kristanigi la Iberan Duoninsulon. Ĉar jaenano, Eŭfrasio venis en sian urbon kaj li fariĝis la unua episkopo de Jaeno, kaj apud li ĉiam troviĝis la kristan relikvon. Dum la islama invado de la Ibera Duoninsulo la Sanktan Vizaĝon gardis la kristanoj, ĝis kiam en la jaro 1246 la kastilia reĝo Ferdinando la 3-a konkeris la urbon, kaj li ricevus la relikvon dankesprime.

La reĝo Ferdinando portis apud li la relikvon dum la konkero de la urbo Sevilo. En la jaro 1252 li mortis kaj la nova episkopo de Jaeno, Nicolas de Biedma, revenigis la Sanktan Vizaĝon en Jaenon. Ekde tiam multaj kristanoj pilgrime venis en la urbon por preĝi antaŭ la relikvo. Tio favorigis ankaŭ la fakto, ke kelkaj Papaj buleoj promesis la pardonon de la pekoj de tiuj kiuj iris Jaenon por vidi la Sanktan Vizaĝon. Laŭdire la Jaenan Katedralon oni konstruis por gardi inde ĉi tiun relikvon, kaj tio povas esti certa, pro la fakto, ke la Sankta Vizaĝo aperas konstante en la ikonografio de la Katedralo. Nuntempe la relikvo estas videbla okaze de specialaj festoj.

## ARABAJ BANEJOJ

La Arabaj Banejoj, ankaŭ kontaj kiel “Banejoj de l’Infano” (*Hamman al-Walad* en la araba lingvo), troviĝas ĉe la subtera etaĝo de la Palacio Villardompardo. Ĝi mezuras 450 m-ojn<sup>2</sup>, do ili estas la plej grandaj arabaj banejoj en Hispanio. Oni konstruis ilin en la jaro 1002, sur la restaĵoj de romia domo, kiu sendube ankaŭ devus esti publika banejo. Post la konkero de la urbo Jaeno fare de la kastilia reĝo Ferdinando la 3-a, ĉi tiu konstruaĵo ankoraŭ utilis kiel banejo dum kelkaj jardekoj. Tamen dum la 14-a jarcento ili malaperis, kaj ekde

tiam oni uzis ilin kiel var-tenejoj. Fine de la 16-a jarcento la kavaliro Fernando de Torres y Portugal, Grafo de Villardompardo kaj Vic-reĝo de Peruo, konstruigis sur la banejoj sian palacon, do ili estis kaŝataj de ĉi tiu nova konstruaĵo.



Komence de la 20-a jarcento la Provinca Registaro de Jaeno aĉetis la Palacon, kun la celo konstrui Virin-Hospitalon. Kiam oni ekigis la rekonstruon de la Palaco aperis la arabaj banejoj ĉe la subtera etaĝo. En la

jaro 1936 oni decidis restaŭri la oldajn banejojn, tamen la ekigo de la civila milito interrompis la laborojn kaj poste la projekton oni forgesis. En la jaro 1970 oni reprenis la ideon restaŭri ilin, kaj tiel en la jaro 1984 la laboroj finiĝis. La restaŭrado meritis en la jaro 1984 la premion al la plej altkvalita restaŭr-laboro en Hispanio.

En la islama civilizacio la korpa purigado estas devo por ĉiu pia islamo, kaj tion oni devas plenumi antaŭ la kvin devigaj preĝoj ĉiutage. Ĉar ne ĉiuj homoj disponis pri propraj banejoj oni konstruis publikajn banejojn, *hamman* en la araba lingvo.

Tiuj de Jaeno havas jenan strukturon:

- Vestiblo (*Al-bajt al-masih*)

Temas pri la enir-ĉambro. Ĝi mezuras 14x 3,80 metrojn. Ambaŭflanke troviĝas du pliaj ĉambroj. La vestiblo estas kovrita de volbo kun 18 stelitaj lukoj. La planko, siatempe, estis farita de blanka marmoro kaj la muroj pentritaj de arkoj ruĝaj kaj blankaj.

- Malvarma Salono (*Al bajt-al barid*)

Tre simila al vestiblo, kvankam iom pli malgranda (11,4 x 3,50 metroj). Ene de ĝi la viroj povis submerĝi en malvarman akvon.

- Mezvarma Salono (*Al bajt al ŭastani*)

Kvadrata salono (11,30 x 11,30 metroj). La volbo ne ripozas sur dikaj muregoj, sed sur ok kolonoj. Ĉe la kvar anguloj de la granda salono troviĝas aliaj kvar malgrandaj volboj. El ĉi tiu granda salono eblas eniri en alian malpli grandan (11,30 x 2,80 metroj), kie baniĝis la plej gravaj viroj.

- Varma Salono (*Al-bajt al-sajum*)

Ĝi mezuras 15,90 x 3,30 metrojn. Ĝi troviĝas tuj apud la kaldronoj kiuj utilis por varmigi la akvon, tiel tra la muroj de ĉi tiu ĉambro troviĝas kaŝitaj fumo-tuboj tra kiuj kuris la akvo-vaporo. Same, sub la planko ekzistas ĉambro tra kiu cirkulis la varman aeron kiu varmigis la plankon de la salono.



**Jaeno**  
Interna Paradizo

## LA KONGRESEJO

La Junulara Restadejo de Jaeno stariĝas sur la antikva hospitalo de la religia ordeno *San Juan de Dios*, ĉe la strato Borja, meze de la historia kvartalo de la urbo. Antaŭ malmultaj jaroj oni rekonstruis ĝin kaj el tiuj laboroj rezultis moderna kaj komforta hotelo.













Temas pri du konstruaĵoj unuigitaj pere de survitra ponteto. La restadejo disponas pri duoblaj ĉambroj kun propraj banĉambroj, kelkaj el ili adaptitaj por la uzo de handikapuloj. La restadejo disponas pri varm- kaj aer-klimatizado, subtera aŭtomobil-parkejo kaj valiz-tenejo. Ankaŭ ekzistas salono por renkontiĝoj kaj granda salono por kongresoj. Krome, oni disponas pri televid-salono, memserva restoracio kaj kafejo.










Unu el la plej gravaj allogaĵoj de la restadejo estas la rilaksadejo. Ĉi-sence oni disponas pri rilaksad-ĉambro por masaĝi, kovrita naĝ-baseno, oksigen-litoj, ktp. Ĉi tiu rilaksadejo ne estas uzata nur de la klientoj de la hotelo, sed ĝi ankaŭ estas tute disponebla de kiu ajn.



### Servoj Disponeblaj

-  Restadejo malfermita 24 horoj.
-  Oni admisias grupojn.
-  Disponas pri familiaj ĉambroj.
-  Televid-Salono.
-  Eblas Interet-konekto.
-  Oni admisias unuopulojn
-  Aer-klimatizado.
-  Manĝejo.
-  Kredit-kartoj akceptitaj
-  Bagaĵo-ĉambro.

-  Levilo.
-  Salonoj.
-  Adaptita konstruejo por handicapitoj.
-  Maten-manĝo inkludita en la prezo.
-  Saŭno.
-  Lavo-butiko.
-  Lito-tukoj inkluditaj en la prezo.

### Ĉambroj

Litoj po ĉambro

Nombro de ĉambroj



6

12

35

Entute: 202 litoj



Historiistoj ne venas en akordon rilate la naciecon de la Doktoro Zamenhof. Oni asertas, ke li estis polo, aliuloj opinias, ke li apartenis al la rusa nacio, eĉ pri litova nacieco oni parolas lastatempe kaj por aliaj li estis pra-israelo. Do, jen mia vico por solvi ĉi tiun aferon, mi povas aserti, ke Lazaro Zamenhof estis andaluzo kaj pli konkrete jaenano. Ĉu vi ne kredas min? Nu, sciuj, ke post multaj jaroj da esplorado, mi eltrovis, ke ekzistas kaŝitaj sekretoj en la gramatiko de esperanto, do la aŭtoro de nia lingvo kaŝis ne-konatajn mesaĝojn kiam li pripensis sian lingvon, kaj tiuj mesaĝoj havas jenan signifon: *mi estas jaenano*.

Se ne, kial la pluralo en esperanto formiĝas pere de la litero J? Eble vi leganto, konanta la slavajn lingvojn, diros, ke pere de tiu fina konsonanto ankaŭ formiĝas la pluralo en la lingvo rusa. Tamen, tio ja ne estas tute certa, ĉar en la rusa lingvo la pluralo ne konsistas en la simpla aldono de la litero И (simila al nia J), sed en la anstataŭigo de la fina litero pere de tiu И, tiel la pluralo de *patro* estus *patri* ne *patroj*. Similan formon adoptis Louis de Beaufront, tio estas la pluralo estus *patri*, *domi*, *libri*, kiam li inventis Idon, sed evidente Beaufront estis parizano, ne jaenano. Kaj kial Zamenhof preferis tiun finaĵon J, okulfrape tiu litero estas la komenco de la vorto Jaeno kaj tiu finaĵo memorigis al li nian urbon.

Se vi ankoraŭ ne kredas je mia teorio, vidu alian pruvon. Kial en esperanto oni uzas la konjunkcion *kaj*, anstataŭ tiuj pli internaciemaj

*et, and, e*? Vi eble respondos, ke ĝi devenas de la greklingva και, tio sendube povas aspekti certa, tamen la reala origino de tiu prepozicio estas alia. Pensu, ke esperanto estas lingvo bazita sur la germana, angla, franca, rusa, itala kaj hispana lingvoj, sed ĉu ankaŭ sur la klasika greka? Tute ne, la devenon de la prepozicio *kaj* ni devas serĉi aliloken. Vidu, verŝajne *kaj* signifas *Kaŝite Andaluzo Jaenano*. Kompreneble li ne povis krei rilate sian originon, tial li devis sciigi pri tio kaŝite, duon-informe, kaj eble la adopto de la prepozicio *kaj* estis taŭga rimedo por tio.

Se vi ankoraŭ ne estas kredema rilate mian teorion, jen definitiva pruvo, kiu ne tolerus kontraŭdiron. Ĉu vi pensis iam pri la ekzisto de la stranga litero *ĥ/H*? La ĉapeligita litero *ĥ* estas invento de



*Jen la nova litero  
proponata de la jaena  
esperantistaro*

Zamenhof mem. Kvankam la sono *ĥ* troveblas en multaj eŭropaj lingvoj kaj kelkaj aliaj kiel la araba kaj la persa, maloftas ke ĝi estas fonemo opozicia al la sono de simpla *h*. Tamen, tio ne okazas en Jaeno, kiel la litero *ĥ* estas la normala prononco de la kastilia litero *h*. Do, Lazaro Zamenhof, alkutimiĝita aŭskulti tiun sonon, kreis, apude al la litero *h*, la specialan, belegan kaj sendube jaen-devenan literon *ĥ*.


Vortoj kiel *arĥivo, ĥemio, eĥo, ĥoro...* sonas kiel ĉielajn sonojn por la oreloj de la jaena esperantistaro, malgraŭ la fakto, ke iuj opinias, kompreneble tute erare, ke ĝi estas terure forta sono. Bedaŭrinde la inteligente eltrovo de Zamenhof rilate ĉi tiun sonon estis tute perfidita, kiam en la jaro 1921 la Akademio de Esperanto aprobis decidon pere de kiu oni permesas laŭvole anstataŭigi la literon *ĥ* pere de *k* en la okazoj, kiam ĝi senpere sekvas post la litero *r*.

Nu, kial? Ĉu la jaen-devena litero *ĥ* ne estas sufiĉe taŭga por nia lingvo? Tio ja estus perfidi la tutan elpensajon de nia kara Majstro, kiu en sia *Fundamento de Esperanto* permesis anstataŭigi la literon *ĥ* nur per la kombino de duobla *hh*, jen alia pruvo pri la jaena deveno de nia kara Zamenhof, ĉar simpla litero *h* estas io sen-forta, ne-potenca,



tamen *hh* estas alia rakonto... Se oni deziras anstataŭigi la literon *ĥ* en kelkaj okazoj, laŭ la decido de la Akademio, tiu situacio devus esti solvita pere de la elpenŝaĵo de nova litero. Pro tio oni proponas la enirigon de la litero *ĥ*, anstataŭebla de triobla *h*, tio estas *hhh*, litero kiu sonus anĝele por niaj jaenaj oreloj. Tio eĉ ebligis la forigon de la simpla litero *h*, litero kiu havas nenian sencon, ĉar kiu jaenano kapablas diri *kioma horo estas?* Neniu! Estus pli facile demandi *kioma ĥoro estas?*, Malgraŭ la fakto, ke la ebla respondanto neniam kantis en *ĥoro*.

Sendube Zamenhof, ĉar jaen-devenulo, aprobus jenan proponon, ĉar ĝia uzo faciligus la nuntempan *ĥaoso*n de la homa komunikado, ĝi estus kiel *ĥirurgio* por la problemoj de interkomprenado inter personoj de malsimilaj lingvoj kaj fine, tio alportus pli bonan *ĥemion* en la interrilatoj de ĉiuj nacioj kiuj nuntempe vivas en konstanta *ĥaoso*. Ne estas *ĥimero* tio kion oni proponas kaj pri kio jam ĉiuj *eĥas*. *Ĥa!* Ĉielaj sonoj!

 *La Magdalena Lacerto*



## NOTOJ

**Andaluzia Esperanto-Unuiĝo**  
**Asociación Andaluza de Esperanto**



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Seviljo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López

Sekretario: Julio Herrero Segura

Kasistino: María Dolores Torres Mateo

Voĉdonanto pri Propagando: José María Rodríguez Hernández

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: [angelarquillos@gmail.com](mailto:angelarquillos@gmail.com)  
[esperanto14@ono.com](mailto:esperanto14@ono.com)

Blogo: [www.andaluciaesperanto.blogspot.com](http://www.andaluciaesperanto.blogspot.com)

Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

\* Universala Esperanto-Asocio  
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)  
[uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net)

\* Hispana Esperanto-Federacio  
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)  
[admin@esperanto-es.net](mailto:admin@esperanto-es.net)

## HIMNO ESPERANTISTA

En la mondon venis nova sento,  
tra la mondo iras forta voko;  
per flugiloj de facila vento  
nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta  
ĝi la homan tiras familion:  
al la mond' eteme militanta  
ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero  
kolektiĝas pacaj batalantoj,  
kaj rapide kreskas la afero  
per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj  
inter la popoloj dividitaj;  
sed dissaltos la obstinaj baroj,  
per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,  
komprenante unu la alian,  
la popoloj faros en konsento  
unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro  
en laboro paca ne laciĝos,  
ĝis la bela sonĝo de l' homaro  
por etema ben' efektiviĝos.